



CONCORDE

Organe culturel

Trimestriel

Direktoro :

Hubert FERÉZ

NICA STELO

ABONO 10 F

Tél. : 84.19.07

Vers une culture, une civilisation supérieures, dans la justice, la paix,
la concorde et la collaboration entre les individus comme entre les peuples

7, Avenue de Reims

C.C. Postal TOULOUSE 632.15

NICE (Francujo)

N° 48

1er TRIMESTRE 1976

LA BELA NICO

=====

par Raymond FIQUET

Cu mi bezonas priskribi Nicon al tiuj, kiuj ne konante ĝin alvenas ĉi tien ? Cu mi devas paroli pri la mildeco de ĝia klimato ? Ĉiuj povas ĝin konstati en ĉiuj sezonoj tuj ĉe la alveno. Paĝoj povus esti skribitaj pri la antikvaj popoloj, t. e. unue la Grekoj kaj poste la Romanoj, kiuj fondis Nicon, verŝajne en la lasta jarcento antaŭ Kristo.

Se la antikva Foseo ("Phocée" aŭ Masilio, nuntempe Marseille), estis la unua albordiĝejo de la Grekoj sur la Mediteranea marbordo, baldaŭ aliaj urboj estis fonditaj : Agde, Nico, Antipolis ankaŭ, kaj tiel Nico naskiĝis.

Sed pli interesas nin la nuna Nico.

Por plena priskribo sufiĉus montri al niaj vizitantoj kelkajn kolorajn poŝtkartojn, per kiuj ili ricevus perfektajn portretojn de la vidindaĵoj : la blua Mediteraneo, kiu borderas la urbon sub blua ĉielo, la palmoj, la oranĝkaj citronarboj, la floroj la plej odoraj, tuj ĉirkaŭ la urbo la jarcentaj olivarboj, kiuj zonas ĝin, kaj, unuhora distance, la vintraj stacioj, kie ĉiuj neĝaj sportoj estas praktikeblaj.

La Alpoj ĉirkaŭas Nicon kaj ŝirmas ĝin de la nordaj kaj orientaj ventoj, dum la Esterela monto protektas ĝin de la okcidentaj.

Alia serio da poŝtkartoj povus montri niajn luksajn palacojn, niajn feriajn kazinojn, kie oni praktikas ĉiuspecajn monludojn, dank' al kiuj oni povas en unu momento fariĝi pli riĉa ol araba petrolproduktanto, aŭ same rapide ĉion perdi, eĉ la monon por la revenbileto.

Niaj Muzeoj estas multnombraj, pri la artoj ĝenerale, kaj fake pri natursciencoj, klasikaj kaj modernaj pentraĵoj, konkvoj, maraferoj k t p ...

Ĉi tie ankaŭ estas multaj Universitatoj, pri juro, medicino, homaj sciencoj, kaj nia Observatorio, plej moderne ekipita al kiu venas la plej famaj astronomoj de la mondo. Ni menciuj ankaŭ la Konservatorio, el kiu de multaj jaroj diseliras tra la tuta mondo multaj virtuozoj pri ĉiuj instrumentoj.

Kaj, se vi vizitas nin en la ĝusta tempo, vi povos partopreni la Kar-navalajn festojn kaj la florbatalojn.

Jen plenmano da poŝtkartoj ...

Sed tio estus nur supraĵa rigardo, kiu lasus nur supraĵan impreson, nenion pli. Mia celo estas multe pli grava. Pardonu se mi ne povas paroli pri Nico sen pasio.

Nico kaj nia regiono estas ne nur tiu lando favorigita de la naturo, kie oni trovas ĉiujn allogaĵojn por distro, plezuro kaj lukso, kio sufiĉas al turistoj. Ĝia destino estas multe pli alta kaj "homa".

Nico, kiu dum jarmiloj restadis eta provinca urbeto, rapidege kreskis dum la lastaj jardekoj. Ĝi disvolviĝis en ĉiuj direktoj kaj ĝia famo etendiĝis sur la tuta mondo. Ne nur ĝia klimato sed ankaŭ ĝiaj akceptaj kaj ĉefe laboraj rimedoj, altiras la tutan jaron pli kaj pli da personoj. Nico celas fariĝi ankoraŭ pli ol turisma ĉefurbo, la ĉefurbo de ĉiuspecaj laboraj kongresanoj de la tuta Eŭropo kaj de la tuta mondo.

Ne parolante pri tiuj, kiuj venas vagonare aŭ per sia propra automobilo svarmas la aŭtobusoj, kies surskriboj atestas la plej malproksimajn devenojn. Por la aliaj, jam de longe nia aviadilejo havas rektajn liniojn kun Usono, Sud-Ameriko, Japano, Sud-Afriko k t p... Se oni volas enpeniĝi pri tiu fenomeno oni povas konkludi, ke Nico ne estas urbo, kien oni venas nur por amuziĝi, sed ke plej ofte estas por renkonti en la plej bonaj kondiĉoj samfakulojn de la tuta mondo en laboraj kuniĝoj, des pli bone se tiuj renkontoj okazas en Paradizo, tio incitas al reveno.

Tiel ĉi tie la fluo de la multlingvaj turistoj aldoniĝas al la fluo de la multlingvaj kongresanoj.

Devigaj konkludoj por ni, Esperantistoj :

Cu ni ne havas gravan respondecon, ni, kiuj staras meze de multege da popolamasoj venantaj de ĉie, kirliĝantaj ĉirkaŭ ni, parolantaj ĉiujn lingvojn aŭdeblajn en la mondo ?

Cu ni ne estas en la plej fekunda grundo por praktiki kaj propagandian karan lingvon ?

Cu tio ne demonstras al ni, ke Nico povus fariĝi la ĉefurbo de "Esperanto en praktiko" ?

Cu ni estus pardonindaj, ĉu ni ne havus impreson perfidi nian mision, se ni ne streĉus ĉiujn niajn fortojn por atingi tiun celon ?

La laboro estas ege ampleksa sed ni havas kelkajn rimedojn. Ili estas ne tre fortaj, pro tio nia unua tasko estas ilin plifortigi.

Nia ĉefa rimedo estas kompreneble la Nica Grupo. Ĝiaj gvidantoj estas viglaj, laboremaj kaj sindonemaj, sed la taskoj estas multnombraj kaj malfacilaj, por ilin plenumi multaj amikoj devas helpi. Ili devos varbi multajn novajn anojn, instrui la lingvon kaj disvastigi nian ideon.

Alia rimedo devus esti la apogo kaj kunlaboro de la najbaraj urboj, agado kun Cannes, Monaco, Grasse, eble Toulon kaj, kial ne eĉ Vintimille kaj San Remo ?

Kaj fine alia flanko helpilo : la bonega bulteno "Concorde" kiu siaflanke laboras en sia propra fako en la sama direkto kiel ni sur paralela vojo por disvastigi la lingvon. Estus bono por ĉiuj, ke ĝi havu ĉiam pli kaj pli da sukceso kaj pli kaj pli disvastiĝu.

Tion mi sincere deziras al la Prezidanto Férez al kiu mi prezentas miajn dankojn por lia granda kaj grava laboro.

Tre baldaŭ okazos nia Federacia Kongreso. Ĝi devos marki la starton al sukceso de niaj klopodoj.

Raymond FIQUET

Les hommes que la raison gouverne, c'est-à-dire les hommes qui cherchent ce qui leur est utile selon les conseils de la raison, ne désirent rien pour eux-mêmes qu'ils ne désirent également pour les autres. (SPINOZA)

42 a KONGRESO ESPERANTISTA DE LA PROVENCA FEDERACIO

NICO (Francio) - 14-15-16 Majo 1976

:--:--:--:--:--:

SOUS LA PRESIDENCE D'HONNEUR DE M. JACQUES MEDECIN

Secrétaire d'Etat au Tourisme - Maire de NICE

==-----==

P R O G R A M O

- Vendredo 14 Majo 1976 : Posttagmeze : televida intervjuo
Gazetara konferenco de Prezidanto GARRIGUE
- 19 h.30 : Interkonatiĝa manĝo : Restoracio "LE BRETAGNE", 5 Rue de Belgique - NICE.-
- Sabato 15 Majo 1976 : 8 h.30 - Ekzamenoj : Hôtel Miron, 4 Rue Miron - NICE
- 9 h. - Vizito urbo : akvofalo de Gairaut, kanalo, akvujo kaj ozona produktejo de Rimiez, arenoj de Cimiez.
- 13 h15- Individua manĝo : "Cafeteria Hippodrome - VILLENEUVE-LOUBET
- 14 h30- Senpaga vizito de la glasfabrikejo de Biot - BIOT
- 16 h30- Inaŭguro de la ĝardeneto Zamenhof (Kvartalo St-Philippe)
- 18 h - Oficiala urbakcepto en "Comité des Fêtes", 5 Promenade des Anglais à NICE
- 21 h - Folkloro spektaklo "Le Caïreù Nissart" kaj variecoj, Teatro "L'Artistique", 27 Bd Dubouchage - NICE
- Dimanĉo 16 Majo 1976 : 9 h-12 h : Kongresaj laboroj. Parolado de Profesoro BEAU
Salle Bréa - 4, Bd Carabacel - NICE
- 12 h30- Foriro de Provenca Stacidomo al COLOMARS-GARE per Speciale TRAJNO
- 13 h - Bankedo ĉe "Auberge de la Manda" - COLOMARS-GARE
- 15 h30- Trajna promenado ĝis TOUET-S/VAR. Vizito de pentrinda vilaĝo (ebleco urbakcepto).
- 18 h - Foriro de TOUET por reiro al NICO - 19 h. 15 : DISIĜO

:--:--:--:--:--:

N. PAZZINI

NOTU : La partprenontoj de la ĉi-supra Federacia Kongreso sin turnu al paĝo n° 5 kaj tuj plenskribu la tie starantan ALIGILON !

==-----==

----- MODERNA MASTRUMADO!

Du gejunuloj eniras en telervendejon

Junulino : Ni deziras unu kukrulon, du kaserolojn, unu fromaĝ-raspilon, kaj du fermoplatojn.

Vendisto : Por prepari viajn manĝaĵojn ?

Junulo : Certe Ne ! Estas por fari nuntempan muzikon.

N.P.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

F O N D S D E S O L I D A R I T E

REVEST Samuel	5 F	BERGER Ronald	10 F
POMEROL Edmond	10 F	LLECH-WALTER René	100 F
CHAUTARD	10 F	LE BROUSTER	5 F
Groupe CANNES	100 F	GARRIGUE François	100 F
BOGO Jean	50 F	CURNELLE René	15 F

Merci à nos généreux Amis !

FAIRE INCINERER LES CORPS ?

=====

POURQUOI ?

=====

Parce qu'il est nécessaire à notre époque de conserver la terre aux vivants. Ni journaux, ni radio ne parlent de crémation. Les intérêts de la population seraient-ils moins à sauvegarder que certains intérêts particuliers ?

Nous ne le pensons pas et cependant lorsque nous voyons les milliers d'hectares de bonnes terres occupés par des tombes, nous ne pouvons éviter de songer à tout ce que les vivants seraient capables d'en faire si ce n'était l'obligation d'en faire des logements pour les morts.

La solution idéale serait la construction, promise depuis bien longtemps, du crématorium qui réaliserait une très importante économie de terrain et nous n'aurions plus obligés de construire des cimetières dans de toujours plus lointaines banlieues, obligeant les familles à de coûteux déplacements pour aller honorer leurs disparus.

Réintégrons nos morts dans la cité car il faut 7 mètres carrés de terre pour une tombe ; la même surface permettrait de loger 28 urnes contenant des cendres. Cela servirait à plusieurs générations et surtout sans courir le risque de pollution de cette terre. L'Eglise catholique, depuis 1963, autorise la crémation de ses fidèles avec cérémonie à l'église ou au domicile mortuaire.

L'on entend souvent dire que la crémation est un luxe et qu'elle revient très cher à la famille. C'est absolument faux. Voyons quelques prix : pour un corps devant être transporté de Nice à Marseille, au crématorium de cette ville, le coût est de 3.000 francs.

Si la ville de Nice possédait son crématorium, il en coûterait la moitié moins ; prenant en cela l'exemple de la ville d'Amiens qui en a construit un, déjà en service, il ne coûte que 740,80 francs tout compris : obsèques et crémation. C'est un peu plus cher à Toulouse où le crématorium fonctionne depuis 1972, mais Marseille est le plus cher de France et les Niçois et tous les résidents des colonies étrangères, très souvent crémationnistes, doivent en passer par là. Pourquoi ?

Venez à notre permanence à NICE, tous les lundis, de 15 à 17 heures, 1, Rue Rossini, Maison des Syndicats, vous nous aiderez à faire comprendre aux pouvoirs publics que notre souci n'est ni politique, ni philosophique : s'occuper des morts c'est aussi s'occuper de l'avenir des vivants.

J.C. MIGLIETTA

ENSEIGNEMENT GRATUIT DE L'ESPERANTO

- 1 - Etude complète en 22 leçons.
- 2 - Aucun livre à acheter : le matériel d'étude est fourni.
- 3 - Réception gratuite du périodique culturel "CONCORDE".
- 4 - Invitations à nos fêtes, rencontres, congrès, etc..
- 5 - Attribution gratuite de correspondant (es) à l'étranger.

42 a FEDERACIA PROVENCA ESPERANTO-KONGRESO :

- A L I G I L O -
=====

NOMO : ANTAUNOMO :

Aĝo : Sekso : Urbo : Strato : N°
Mi alvenos (dato kaj horo) Trajne, aŭtomobile

Mi deziras tranokti (Ĉirkaŭbari la deziratajn noktojn kaj ĉambrojn)
13-14 14-15 15-16 16-17 17-18

Unupersona ĉambro : sen duŝo kun duŝo kun bano kaj necesejoj
30 45-50 55

Dupersona ĉambro : 1 lito 40 56 70
2 litoj: 45

Matenmanĝo inkluzive

Kongreskotizo 10 Pago : 10
Promenado-ekskurso de Sabato, 15 Majo 15 Pago : 15
Veturado por bankedo kaj dimanĉa
promenado al TOUET-SUR-VAR 15 Pago : 15
Bankedo de dimanĉo 16 Majo (ĉio inkluzive) 40 Pago : 40
Rezervado por loĝado 25 Pago : 25

Dato : Subskribo : Sumo kunsendita : 105

Mi deziras trapasi ekzamenon : 1a grado, 2a grado, 3a grado.
Specialaj deziraĵoj (vegetarano, nefumanto, k. t. p.)

ALIĜO - Sro LLORENS - Hôtel Miron - 4, Rue Miron - NICE

PAGO - Groupe Espérantiste de Nice - 34, Bd du Righi - 06100-NICE
Poŝtĉeko : MARSILLE 1107-93

Aliĝo sen pago ne valoras - Limdato : 30 aprilo 1976 -

N. PAZZINI

o-o

==== 68 a NACIA KONGRESO DE ESPERANTO - LA GRANDE MOTTE =====
(departemento Hérault)
=====

Kongresejo : V.V. LES CYCLADES . Por aliĝo, skribi al S-ino NEGRON, 22 Chemin
du Mont-Blanc - 34400-LUNEL. Kaj la pagon al G.E.M.-C.C.P.-MONTPELLIER 2142-19
Aliĝo sen pago ne valoras.

	<u>Kotizoj</u> :	<u>ĝis la</u>	<u>ĝis la</u>	
		31.1	15.3	
Kongresano (in) o	45 F		50 F	La Kongreso daŭras de la 16 à ĝis la 20 à de Aprilo 1976
Geedzoj	60 F		70 F	
Studentoj kaj				
Junuloj sub 22 j.	15 F		20 F	

Eksterlandanoj : senpage

o-o

===== IMPONA MANIFESTADO EN DEPARTEMENTO VAR =====

Nia senlaca samideano A. MATHIS, animateur de l'Amicale des Parents d'Elèves des Cours d'Esperanto du Canton de Solliès-Pont (apud Tulono) sukcesigis sukcesplenan celtrafan esperantistan manifestadon la 15 an de februaro en Solliès-Pont-La Farlède.

Jan antaŭ la deka, alvenis la esperantistoj, reprezentantaj la grupojn de : Monte-Carlo, Nico kun G. Goudin kaj Prezidanto Parisot, Grasse, Cannes, Hyères, canton de Solliès-Pont, Marseille, Aix-en-Provence, Carpentras kaj Crest ; Sro Granier el Grenoble sendis leteron. La urbestroj de La Farlède kaj Solliès-Pont prezidis akompanataj de du vic-urbestroj. La ĉeestantoj estis akceptataj en belega salono de la nova urbodomo. Ĝis la 12a okazis vigla diskuto pri senokupado de la lernantoj dum la ferioj de la lerneja jaro kaj ankaŭ pri la malfacileco de la propagando. Parolis interalie : Sinjoroj Garrigue, Mathis, Jullien, Goudin, Cavelan, Amat, Farjon kaj multaj aliaj. Je la 12 a la urbestro akceptis la kunvenintojn per honorvino en apuda salono kaj je la 12a ĉiuj sin direktis al V.V.F. al Le Pradet, kie atendis ilin bonega familia manĝo. Trinkante kafon okazis speciala vendado (vente à l'américaine) de belega desegnaĵo de unu el la lernantino de la "Amicale". Fine la knabibo, kiu faris la desegnaĵon diris poemon de ŝi verkitan.

La arta parto de la posttagmezo estis la fako de kantistinoj, kiuj kantis ĉu provence, ĉu esperante. Sinjorinoj CAVELAN kaj KLEIN estis multe aplaŭditaj.

Sed bedaŭrinde fariĝis vespero kaj je la 18 a horo, ni devis disiĝi. Ĉeestis tiun ceremonion 80 personoj.

Ni dankegas la direktorinon kaj la laboristinojn de la V.V.F. pro ilia afableco.

M O T I O N

=====

adoptée par l'assemblée des Centres Culturels de Provence au cours de leur réunion du 15.2.1976 à l'Hôtel-de-Ville de La Farlède. Étaient présents les Centres de : Monte-Carlo, Nice, Cannes, Grasse, Hyères, Canton de Solliès-Pont, Marseille, Arles, Carpentras, Aix-en-Provence, Crest et Grenoble. La séance était présidée par MM. les Maires de La Farlède et de Solliès-Pont.

"Les délégués des centres culturels constatant que les écoliers (enfants et adolescents) manquent généralement d'occupation pendant les congés scolaires de la Toussaint, du Nouvel An et de Pâques (le tout représentant un peu plus de six semaines) et pensant que ce désœuvrement ne peut que leur être préjudiciable, souhaitent que les pouvoirs publics se penchent sur ce problème et organisent des centres éducatifs pour pallier à cet inconvénient.

Les Centres Culturels d'Esperanto sont prêts à participer à cette initiative en attendant que la proposition de loi n° 1667, déposée le 16 Mai 1975 sur le bureau de l'Assemblée Nationale et demandant l'introduction de l'Esperanto, à titre facultatif, dans les Etablissements du second degré, soit prise en considération".

(Propono sendota de la Urbestro de La Farlède al la loka Prefekto)

A. MATHIS

-o- MINISTERE -SEPTANTE- SIX -o-

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Septante cinq, septante six,
Un compte digne de Thémis !
Dans un fracas d'exubérance
L'An Neuf nous tend son espérance
Et tous portant jupe ou veston,
Nous l'acceptons

L'an qui s'en va, vieille baderne,
Dépend sa minable lanterne.
A coups de brique et de chaussons,
Nous le chassons

Parce que nous sommes artistes,
Ce rideau de fine batiste,
Cachant fontaines et frontons,
Nous l'écartons

Et cette joie entière et saine
Que répand en propre la scène,
Fresque d'art clair et de flonflons,
Nous la voulons

Mais un monde sans nul ministre
Deviendrait sordide et sinistre,
Le pouvoir, candide ou démon,
Nous l'assumons

Et puisqu'il faut du ministère
Pour ne pas être terre à terre
En cave, en cercle, en grand renom,
Nous gouvernons.

Au travail donc, mes chers collègues
Les sourds, les muets et les bégues
De l'air vif des belles saisons
Nous nous grisons.

Venez çà, gloutons, dévoreuses :
L'appétit d'un fol espoir creuse ;
Pour tenir tête à la raison
Nous nous posons

Face au nouvel éphéméride,
Oublions tracas, maux et rides !
Gloire est promise à l'horizon
Dans la maison.

Norbert PAZZINI

Komentu ĉiam kaj ĉie nian slogano
POR kaj PER ESPERANTO

C O M M U N I Q U E S

TOULON-83 - "La afero" disvolviĝas bone !" Multe da kursoj kaj multe da lernantoj. Detala raporto en la proksima numero.

NICE -06 - Le nouveau Comité du Groupe Espérantiste de Nice (séance du 17 Février 1976) se compose maintenant de :

Président : Georges PARISOT ; Vice-Présidente : Marie-Louise COMINO ;
Secrétaire : Fernande LENOIR ; Kasisto : Norbert PAZZINI, Robert LLORENS,
Robert CERISIER. Présidents Honoraires : Raymond FIQUET, Hubert FERREZ.

ACTION CONCORDE : Dès le début de son action morale et sociale, CONCORDE a tenu à faire considérer Nice (Côte-d'Azur par extension) comme le Haut-Lieu de l'Espéranto dans le monde. Monsieur Jacques MEDECIN, Secrétaire d'Etat au Tourisme, Maire de NICE, Président du Conseil Général des Alpes-Maritimes, d'un constant dévouement à son pays et aux causes généreuses et humanitaires, a aussitôt honoré cette initiative par son total accord qu'il exprime par sa lettre à Hubert FERREZ et datée du 10 Juin 1975 : "Je viens de recevoir votre lettre du 3 Juin par laquelle vous m'exposez votre projet d'action pour faire de NICE un Haut Lieu de l'Espéranto. J'en ai pris connaissance avec beaucoup d'attention et je fais procéder aussitôt à une étude de vos suggestions par les services intéressés."

Nos amis du Groupe de NICE (principalement Fernande Lenoir et Georges Parisot) ont pris contact avec les services intéressés pour faire réaliser, à l'occasion du Congrès Fédéral Espérantiste, une des premières suggestions applicables à la Ville même : celle de la création d'un square portant le nom du génial Dr Zamenhof, le créateur de l'Espéranto.

Le GERANT : Hubert FERREZ